

August Heinrich Hoffmann,  
Abendlied

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Nun vesper' fariĝas  
Ree tie ĉi,  
Paco subeniĝas  
Kaj ripozas ni.

Rivereto fluas  
Ĉe la roko sen  
Ĉeso kaj ĝi bruas  
Plu kaj plue jen.

Sonoril' neniu  
Ripozigas ĝin,  
Ne dormigas iu  
Ĝin je l' tagofin'.

Tia, mia koro,  
Estas ankaŭ vi.  
Donu, ho Sinjoro,  
Pacon vi al ĝi.

...

August Heinrich Hoffmann,  
Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ree vesperiĝas  
ĉie en la rond',  
paco subeniĝas  
kaj ripozas mond'.

Riveret' nur fluas  
ĉe la roko jen,  
kaj ĝi daŭre bruas  
plu kaj plu sen ĝen'.

Ne vespero iu  
endormigas ĝin,  
sonoril' neniu  
je la tago-fin'.

Mia koro, tia  
estas ankaŭ vi!  
Pacon trovos mia  
koro nur en Di'.

...

August Heinrich Hoffmann,  
Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Surkampare iĝas  
ree nun vesper',  
milde subeniĝas  
paco de l' eter'.

Nur de l' roko bruas  
rivereta flu',  
kaj la akvo fluas  
ĉiam ĉiam plu.

Ne haltigas iu  
ĝin je l' tagofin',  
kaj vesper' neniu  
ripozigas ĝin.

Mia kor', senlace  
strebas ankaŭ vi,  
vi ripozos pace,  
nur se volos Di'.

...

Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (*Hoffmann von Fallersleben*, \*1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (*Manfred Retzlaff*, *Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio*, \*1938-11-04) en 2012-11.

Arg-645-1378 (2012-11-27 18:34:25)

Vidu ankaŭ: [http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied\\_\(Fallersleben\)](http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_(Fallersleben)). La muziknotoj troviĝas en [http://www.lieder-archiv.de/abend\\_wird\\_es\\_wieder-notenblatt\\_300026.html](http://www.lieder-archiv.de/abend_wird_es_wieder-notenblatt_300026.html), la melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.

Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (*Hoffmann von Fallersleben*, \*1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2013-01-27.

Arg-645-1943 (2014-01-28 23:29:57)

La melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.

Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (*Hoffmann von Fallersleben*, \*1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1988-04-16.

MR-212.1 / Arg-645-1302 (2012-11-04 23:01:54)

Pri la aŭtoro vidu la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/August\\_Heinrich\\_Hoffmann\\_von\\_Fallersleben](http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben). La melodion verkitan de Christian R. Rinck oni povas aŭdi en <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/abendwir.html>. Pri la komponisto rigardu: [http://de.wikisource.org/wiki/ADB:Rinck,\\_Johann\\_Christian\\_Heinrich](http://de.wikisource.org/wiki/ADB:Rinck,_Johann_Christian_Heinrich).